

Leterujo kaj Eŭropa mona konvencio, 4-a parto
Claude Gacond, 125-a radioprelego, 1966.02.23 & 1966.02.26

Claude Gacond : Atentu esperantistoj ! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas Claude Gacond, Andrée Gacond kaj Cosette Giroud.

Aro da geaŭdantoj pruvis denove sian intereson por niaj prelegtemoj sendante leterojn kaj poŝtkartojn. Fine de februaro ni citas kun plezuro iliajn nomojn kaj diras al ili niajn salutojn. Ili sciu, ke iliaj viv-signoj estas multilate pozitivaj. Per ili ni povas desegni la geografian disvastiĝon de la aŭskultado de nia esperantista aŭskultantaro. Per ili ni povas starigi sliparon pri la aŭskulta fideleco. Ni ekzemple ricevas salutojn de aŭdantoj, kiuj jam skribis antaŭ pli ol tri jaroj, kiam elsendoj tuŝis al similaj temoj.

Andrée : Tio estas pruvo, ke ekzistas fidela aŭskultantaro. Sed kun ĝi ni povas konatiĝi nur ricevante salut-vortojn.

Claude : Do ne hezitu preni kelkfoje plumon por skribi al ni viajn interesojn kaj fari ankaŭ kritikojn, se preleg-temo igis vin grumblema.

Cosette : Ni do malfermu nian leterujon. Salutis sinjoro R. Imbert en Zagreb (Jugoslavio), sinjoro Gaston Vidal en Aubière (Francio), sinjoro Jiri Patera Most en Prubezna (Ĉeĥoslovakio) kaj sinjoro Pal Balkanyi en Budapeŝto (Hungario).

Claude : Ni verŝajne ofte malbone prononcas la nomojn de niaj korespondantoj. Tion verŝajne rimarkis sinjoro Lenart Oberj en Skovde (Svedio), kiu donis fonetikan transskribon de sia nomo, bona metodo ĉe por-radia korespondado.

Andrée : Fraŭlino C. Hueter en Clermont-Ferrand deziras koni la adreson de la Natur-Amika Asocio, kiu eldonis belegan memorigan broŝuron en kvar lingvoj, inter kiuj esperanto. Ni respondu pere de niaj ondoj, ĉar verŝajne aliaj geaŭdantoj deziras tiun ĉi informon. Do trovu rapide kraĵonon kaj skribu :

Claude : Turista Asocio « La Natur-Amikoj », poŝtfako 281, Zuriko, Svislando. Mi ripetas : Turista Asocio « La Natur-Amikoj », poŝtfako 281, Zuriko, Svislando.

Cosette : Tiu aŭdantino petis ekzempleron de la 12-lingva prospekto pri la Svisa Trafikmuzeo en Lucerno. Ŝi dokumente sendis alian prospekton pri la urbo Vichy, kies varb-lingvo ankaŭ estas esperanto.

Claude : Ĉiuj aliaj skribintoj diris sian intereson pri nia raporto koncerne la proponon por Eŭropa Mona Konvencio far la franca Stud-rondo Lamennais.

Andrée : Inter ili ni salutu sinjoron Gerhard Kunze en Berlino, sinjoron Personne en La Varenne (Francio), la Esperanto-Rondon Heil und Pflegeanstalt en Wil (Svislando), sinjoron August Schulte en Herten (Germanio), sinjorinon E. Kohler en Besançon (Francio).

Claude : Tiu aŭdantino sendis adresaron de personoj, kiuj havas intereson por tiu temo : Ĉar ni respondas nur al skribintoj, ni simple sendis tiun adresaron al la sekretario de la Stud-rondo Lamennais.

Cosette : Ankoraŭ skribis pri tiu temo sinjoro C. M. Cather en Torquay (Britio), sinjoro Jarzy Mazys en Varsovio (Pollando), sinjoro Oskar Breddermann en Esslingen (Germanio) kaj sinjoro Ivica Šponar en Frankfurto (Germanio).

Claude : Tiuj du germanaj aŭskultantoj skribis longajn kaj interesajn leterojn, kiuj valoras citadon kaj atentan respondon.

Andrée : Sinjoro Šponar verŝajne estas filatelisto, ĉar li sendis interesan poŝtmarkon kaj kritikis poŝtmarkan komparon.

Leterujo kaj Eŭropa mona konvencio, 4-a parto
Claude Gacond, 125-a radioprelego, 1966.02.23 & 1966.02.26

Claude : Mi citas la koncernan leter-eron : « *Hodiaŭ tagmeze kaptis mian atenton la eksterordinara kaj el pluraj vidpunktoj interesa elsend-temo pri la eŭropa mono. Sed, se vi permesas, mi havas negravan kritikan rimarkon, kiu ne rekte rilatas al la temo mem, sed nur al unu en ĝi uzita, iom malfeliĉe elektita komparo, kiun mi ne trovis ĝusta. En tiu ekzemplo vi asertis, ke ne ekzistas poŝtmarko, kiu estus kun aŭfrankvalido aĉetebla kaj uzebla en iu poŝtoŭficejo ekster la **naskiĝlando** de la koncerna poŝtmarko.* »

Cosette : Kaj tiu aŭdanto aldonis al sia letero jugoslavi-rumanan poŝtmarkon el la pasinta jaro, kiu havis du malsamajn valutojn : 50 dinarojn kaj 55 baniojn, kaj du diversajn ŝtatnomojn : Jugoslavio kaj Rumanio.

Claude : Tiu poŝtmarko estis egale valida en ambaŭ ŝtatoj, kaj ne nur en la naskiĝlando Jugoslavio.

Andrée : « *Ĉu tio estas ĝis nun unika kazo, sin demandas sinjoro Ŝponar, aŭ ĉu ekzistis similaj jam antaŭe ?* »

Claude : Eble aŭdanto konas alian similan ekzemplon.

Cosette : Tamen ĉu tiu poŝtmarko kontraŭdiras vian komparon ?

Claude : Mi pensas, ke ne ! Laŭ la propono de la Stud-rondo Lamennais ĉiuj naciaj monoj devus alpariĝi al neŭtrala supernacia spez-unuo. Ĉar tiu propono sin direktis al Eŭropa Ekonomia Komunumo la proponata nomo por tiu spez-unuo estas **Europa**. Pro tiu alpariĝo al internacia spez-unuo la naciaj monoj perdus ĉian valoron profite al tiu mon-unuo ekster siaj naciaj limoj, kiel nun poŝtmarko. Certe landoj povus ĝemeliĝi kaj uzi saman monon, kiel por tiu poŝtmarko faris Jugoslavio kaj Rumanio. Tio ja fakte jam okazas. Liĥtenŝtejno mone estas ĝemeligita al Svislando, Monako al Francio, kaj certe ni povus citi aliajn ekzemplojn.

Andrée : Aliaj demandoj bezonas respondon. Ni do revenos al tiu temo dum venonta elsendo.

Claude : Do aŭskultu regule Radio-Svislandon. Hodiaŭ vi aŭdis Claude Gacond, Andrée Gacond kaj Cosette Giroud, kiuj diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-